

## & Ministro-filistro:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 287 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun dediĉo: Humile dediĉita al Ministro Bérard, kiu malpermesis Esperanton. Baladigis Martin Strid (2016) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Sic transit gloria mundi.>

### (#Melodio:

<:41> (

/LAtI DoRe MiFa MiDo; LaTi doTi LaSo MiDo; LaTi doTi LaSo Mi; ReFa MiRe DoMi So; ReFa MiRe Mi Mi;

(#Rekantaĵe: DoRe MiFa MiRe MiDo; LaTi doTi LaSo MiDo; LaTi doTi LaSo Mi; ReFa MiRe DoMi So; TIRe DoTi LA LA A)

)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 /Foje regis en Francujo ; La Ministro de l' inkujo, ; Estis li sinjor' Bérard, ; Klera viro, sen erar', ; Sed – li estis stulta!

(×:; **Fluas akvo sub la ponto ; ĝis la maro de la monto. ; Sur la ponto pasas multo ; kaj de saĝo kaj de stulto ; kaj por homa honto.**)

'2 Kaj li pli ol virin-amon ; ŝatis sian propran famon, ; Estis lia kor-dezir' ; Tuj fariĝi glora vir' ; Kaj kolekti laŭrojn! .....

'3 Li do pensis unu tagon: ; "Nun mi faros gloran agon!" ; Kaj tuj senhezite li ; Kun laŭdinda energi' ; ... Skribis cirkuleron! .....

'4 Li dekretis tre severe: ; "Esperanto estas vere ; Senespera utopi' ; Kaj cetere diras Mi, ; Ke ĝi ne ekzistas!" .....

'5 Ĉu ĉi tiu fuŝprofeto ; Nun sukcesos per dekreto ; Malkonstrui en moment' ; La esperon de jarcent', ; Nian karan lingvon? .....

'6 Ho, Ministro kun la Plumo, ; Via famo estas... fumo! ; Dum, kun via cirkuler'; Vi jam kuŝos sub la ter' ; Vivos Esperanto! .....

'7 Eĉ Ministro fuŝkonsila ; Povas esti tre utila, ; Li kun tiu ĉi program' ; Faris certe por reklam' ; Pli ol cent poetoj!! .....